

Sonorilo

63-a jaro, n-ro 3

septembro-decembro 1971

BELGA ESPERANTO-FEDERACIO




Sonorilo

DUMONATA BULTENO DE B.E.F.

REDAKCIO: Roose Fernand, Sint-Klaradreef 59, Brugge Tel. (050) 319.81
Maertens Grégoire
Poupeye Charles

ADMINISTRADO: Balleux René, Oude Donkiaan 83, 2100 Deurne



ASOCIO SEN PROFITA CELO

Sint Bernardse Steenweg 1078, Hoboken. Tel. (03) 276643

HONORA ĜENERALA PREZIDANTO

Jaumotte Maurice (+)

HONORA PREZIDANTO

D-ro Kempeneers Paul

HONORA VICPREZIDANTO

Sielens Henri

FEDERACIA PREZIDANTO

D-ro Denoël Pol, 20 rue V. Raskin, Liège

VICPREZIDANTOJ

Jacobs R. — Poupey Ch.

ĜENERALA SEKRETARIO

Verstraeten Jules, St. Bernardse Steenweg 1078, 2710 Hoboken

FEDERACIA KASISTO

Balleux René, Oude Donkiaan 83, Deurne

POŝTKONTO DE B.E.F.: 1634 34 OUDE DONKLAAN 83, 2100 DEURNE

ĈEFDELEGITO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

F-ino Orsolini A., rue P. Pastur 6, 6000 Charleroi. P.K. 2016 40



56-a Universala Kongreso de Esperanto 31.7 – 7.8.1971

La inaŭguro de tiuj kongresoj estas ĉiam tre impona manifestacio. Kiam ĝi komenciĝis en la Royal Festival Hall ceestis pli ol 2 000 kongresanoj el almenaŭ 40 landoj.

Tiu-ĉi jaron ĝi okazis — kiel 'Heroldo' skribis — en la koro de la Angla lingvo. Efektive tiu lingvo estas la plej forta opo-
nanto de Esperanto. La fakto ke nia lingvo estas la solvo de la internacia lingvoproblemo devas esti demonstraciata en tiu loko. Aliflanke, eble, tiu urbo estas tro granda por ke iu ajn kongreso estu evidente rimarkata. Despli tio estas bedaŭrinda ĉar la diversaj, tre multaj eroj de universala kongreso kiel teatraĵoj, konferencoj, kunvenoj de juristoj, kuracistoj, religianoj, ktp. ne povas esti impresi ĉiun seriozan observanton. Ni povas certigi ke ili troviĝas sur alta nivelo. Kaj rilate la lingvon mem, kion signifas la paroladoj de Bossuet por la Franca, tion signifas — en alia stilo — la paroladoj de Lapenna por Esperanto.

Sed ĉio tio iom perdiĝas en la grandega amaso da eventoj, en la koloseco de la urbo. Aldonu al tio ke tiuj personoj kaj institutoj kiuj okupiĝas pri (inter) lingvaj problemoj, kaj kiuj do devus objektive pristudi kaj priserĉi la solvon de la multaj problemoj, tre ofte faras kvazaŭ ili obstine kaj kontraŭ ĉia racio ne volas agnoski la fakton Esperanto. Tio montriĝis denove dum la ĝenerala kunveno de UEA kiu estis debato pri la problemoj de la lingva komunikado en nuntempa mondo kaj al kiu estis invitataj organizoj de grandaj lingvoj kiel 'Alliance Française', 'Goethe-Institut', Universitato de Moskvo kaj British Council. Nu, nur tiu lasta sendis reprezentanton... kiu kompreneble defendis la oficialan ŝtatan starpunkton.

Ja, ni scias depost longa tempo ke la regantoj de la grandaj nacioj havas sur lingva tereno nur unu ambicion: plej eble disvastiĝi sian lingvon kaj trudi ĝin dum internaciaj kunvenoj. Restas la tasko montri al ĉiuj neregantoj de tiuj nacioj ke nur nia lingvo povas solvi la problemon. Kaj, feliĉe ni iom sukcesas en tiu laboro. Ankaŭ nun la kongreso estis sufiĉe vaste raportata en la Anglaj ĵurnaloj kaj eĉ ĉe la BBC. Ni esperu ke ili trovu eĉon ĉe la Brita publiko pri kiu ni scias ke ĝi kapablas esti tre kritika ankaŭ je propra registaro.

Kiel kutime estis dum tiu kongreso Somera Universitato, film- kaj teatroprezentadoj. Nun distingiĝis la Bulgara Esperantista teatro-grupo. Estis krome tre multaj kunvenoj de kvakeroj, Protestantoj, Katolikoj, spiritistoj, ktp. Al la laborkunvenoj de UEA partoprenis tre multaj kongresanoj: kio montras ilian intereson en la stato kaj farto de tiu organizo.

Mi volas ankaŭ substreki la helpon de kelkaj de nia B.E.F.-anoj en la laboroj de la kongreso: Wim de Smet en ISAE; Chr. De Clerck kaj Agnes Geelen en la infankongreso; Gr. Maertens kiel prezidanto de la H. Hodler-fondaĵo; P. Denoël en la komitato. Tiu lasta klopodis atingi ke la E-movado organizu ĉie je proksimume sama dato iun Esperanto-tagon-manifestacion kiel ni havis en Bruselo la 1an de majo '71. Ni eble ne tro insistu pri disputoj kiuj ankaŭ okazis, kaj kiuj estas tamen, kaj feliĉe, efemeraj. Por fini ni sekvigas tie-ĉi la du rezoluciojn, kiuj kompreneble ne havas ian efikon, sed al kiuj ne malmultaj esperantistoj ŝajne atribuas grandan valoron.

SUR LA KOVRILLO: Reprezentantoj de landaj asocioj atendas sian vicon por saluti la Universalan Kongreson en Londono (foto el la Inaŭguro).

HET WELGEKENDE
MAGAZIJN VOOR MODERNE HERENKLEDING



in't duifken

GROTE KEUS
IN GEREDE KLEDING

KOSTUMEN - SPORTJASSEN - BROEKEN
UNIFORMEN - GABARDINEN - LODENS
STIJLVOL MAATWERK

KOEPOORTSTRAAT 64-66, ANTWERPEN

RABATO POR ESPERANTISTOJ

KONGRESA REZOLUCIO

La 56-a Universala Kongreso de Esperanto, okazinta en Londono de la 31-a de julio ĝis la 7-a de aŭgusto 1971 en la ĉeesto de 2 100 reprezentantoj el 40 landoj,

- 1 Notas kun kontento la grandan interesiĝon, kiun elvokis ĉe la publiko de la kongresa lando kaj internacie la ĉeftemo de la Kongreso 'La Problemo de Lingva Komunikado en la Moderna Mondo', pritraktita en formo de Forumo en la ĝenerala kunveno de la Kongreso de la 4-a de aŭgusto,
- 2 Esprimas sian dankon al la raportintoj, al British Council, Goethe-Institut kaj aliaj institucioj aŭ organizaĵoj pro iliaj kontribuoj kaj atento,
- 3 Konstatas, ke la prezentitaj raportoj, aldonaj raportoj kaj kontribuoj ankoraŭfoje evidentigis la eksterordinaran gravecon de la problemo de interkomunikado per lingvo en internaciaj rilatoj en mondaj kadroj; ke tiu problemo postulas urĝan solvon, pro kiu, pro la konfliktantaj intereso de la naciaj lingvoj, la neŭtrala Internacia Lingvo prezentiĝas kiel la plej racia solvo,
- 4 Komisias la Estraron de Universala Esperanto-Asocio komuniki tiun ĉi Rezolucion al Unuiĝintaj Nacioj, al UNESCO, al reprezentitaj institucioj kaj aliaj interesitaj internaciaj kaj naciaj instancoj.

La materialoj de la Forumo estos publikigitaj en la revuo 'La Monda Lingvo-Problemo' eldonata de Mouton & Co. Postbus 1132 Den Haag, Nederlando, sub aŭspicio de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo.

EŬROPA KOMISIONO: — REZOLUCIO

Reprezentantoj el la landoj de la Eŭropa Ekonomia Komunumo (Komuna Merkato) — ŝtatoj-membroj kaj kandidatoj-aparte kunvenantaj en la kadro de la 56a Universala Esperanto Kongreso en Londono, de la 30.7.1971 al la 7.8.1971, KONSTATINTE ke okaze de la ĵusa oficiala intertraktado pri eniro de Britujo en la E.E.K., publike evidentigis la ekzisto de grava lingvo-problemo en la sino de oficiala internacia organizaĵo,

NOTINTE kun intereso la fakton, ke la uzado de unu lingvo kiel ĉefa lingvo estis tiukaze sugestita, malgraŭ la formala egaleco de lingvoj en la komuna merkato, KONVINKIĜAS tamen, ke tiu sugesto de unu nacia lingvo por ludi tiun rolon, pli malpli frue kreos netaŭgan laboretoson, pro ĝia diskriminacia karaktero kontraŭ aliaj lingvoj,

KONSCIAS, ke tiu situacio ankoraŭ pli graviĝos tiam, kiam la E.E.K. etendiĝos al aliaj landoj, kun diversaj lingvoj,

KONTRAŬSTARAS la kredon, ke iam unu nacia lingvo povos esti la Eŭropa lingvo,

CERTIGAS, laŭ propra sperto, ke la neŭtrala Lingvo Internacia Esperanto absolute taŭgas kiel solvo por rektaj interrilatoj interne de la eŭropaj organizaĵoj kaj pli ĝenerale inter la eŭropaj popoloj mem... neniel malhelpante la pluan liberan evoluon de la naciaj kulturoj kaj lingvoj,

ATENTIGAS denove, kiel konfirmis lingvistoj kaj scienculoj, ke la pli ol 80-jara tradicio de Esperanto pruvis ĝian valoron kiel esprimkapablan lingvon, interalie de diplomatio, juro, ekonomio kaj politiko,

AKCENTAS plue, ke nur la universala uzo de Esperanto por la mondaj internaciaj rilatoj restas la sola rimedo por forigi la lingvajn problemojn.

FONDAĴO M. Jaumotte - Loquet

FONDAĴO por la Disvastigo de la Informado pri ESPERANTO

transpreno 135.005 BF

FORVENDO DE
LA BROŝURO

"Esperanto dans
l'enseignement"

7.000

142.005

Koran Dankon! (pagoj akceptataj pere de la pĉk 2914 29 de Maertens Gr., Sint-Kruis.)

someraj universitataj kursoj

De 1972 Belgio estos scenejo de nova kaj vere unika Esperanto-aranĝo: en la Universitato de Lieĝo, pli speciale en ĝia modernega kampuso de Sart-Tilman, okazos ĉiusemere dum pluraj semajnoj universitataj kursoj, kies instrulingvo estos nur Esperanto!

Ni jam nun povas atendi ke ĉi tiuj kursoj havos grandan influon sur la tuta Esperanto-movado en Belgio. Ili donos pli specialan prestiĝon al la internacia lingvo. Krome ili ebligos ke per tio oni kontaktos mediojn, kie ĝis nun oni apenaŭ povis citi ion pri la ideo de Internacia Lingvo. Ne nur la urbo Lieĝo, sed tuta Belgio, kaj eĉ la tuta mondo profitos de tiu ĉi iniciato en la Esperanto-movado. Ni povas esperi ke multaj gejunuloj lernos Esperanton kun la celo povi ĉeesti tiujn kursojn.

Kiel do tiu afero naskiĝis? Ni diru ke ĝi estas grandparte belga afero. Jam de 1962 la subskribinto de ĉi tiu teksto agis por la starigo de esperantlingva universitato aŭ minimume por esperantlingva universitata instruado. Plejparte la klopodoj restis vanaj. Sed en aŭgusto de 1969 li trovis favoran eĉon ĉe nederlanda kaj germana amikoj. Okaze de la Trilanda Renkontiĝo en Jalhay je la 19a de oktobro 1969, la afero estis iom pridiskutita. Kelkajn semajnojn poste, je la 7a de decembro, hejme ĉe li, en Kalmhout, la tri iniciatintoj metis firman bazon de la projekto. Sekvis poste pliaj renkontiĝoj inter tiuj tri personoj en Aachen, en Merken, en Rotterdam. Kaj okaze de la 55a Universala Kongreso de Esperanto en Vieno (aŭgusto) la projekto estis submetita al pluraj gravuloj de la Esperanto-movado kaj akiris grandan subtenon.

Sekvis nun la periodo por serĉi la konvenan lokon. Post pluraj kontaktoj kaj vizitoj de belgaj kaj alilandaj universitatoj aŭ kulturaj centroj kaj post utilaj diskutoj okaze de la Trilanda Renkontiĝo en Valkenburg je la 11a de oktobro 1970, la prefero iris al Lieĝo. Je la 19a de decembro 1970 falis la decidoj: Lieĝo estos la universitata ejo, la periodo de la 30a de julio ĝis la 27a de aŭgusto 1972 estos la unua kursperiodo kaj la studdirektoj lingvistiko kaj medicinaj sciencoj estos la kursobjektoj de la jaro 1972. La organiza komitato pligrandiĝis per kvara persono, asistento en la universitato de Lieĝo, kaj poste per profesoro E. Natalis, emerita profesoro pri pedagogio ĉe la universitato de Lieĝo.

La belga Esperanto-Federacio tuj montris grandan intereson pri la projekto. Ĝi decidis disponigi rentumon de la Fondaĵo Jaumotte-Locquet por kelkaj dekomencaj kostoj kaj ĝi jam tuj sugestis sian aŭspiciadon. Tiuj estas vere laŭdindaj iniciatoj de BEF! Kelkaj aliaj esperanto-instancoj bedaŭrinde ne tiel favoras la tamen ege promesplenan projekton. Aliflanke el pluraj direktoj jam envenas financa kaj morala subteno, eĉ de ekster la Esperanto-medioj.

Ne estas dubinde ke tiuj Someraj Universitataj Kursoj meritis multan intereson en la belgaj Esperanto-grupoj, speciale ĉe la junularo. Multaj informoj pri ili ankoraŭ aperos en ĉi tiu revuo. Sed interesitaj personoj jam de nun povas turni sin al la adreso de SUK: boîte postale 9, 4000-Liège 3.

W.M.A. DE SMET

INTERNACIA ESPERANTO-KONGRESO

ANTVERPENO (BELGUJO) (28)29-4 ĝis 1-5, 1972

(54-a Belga E-o Kongreso, 10-a Markola Kongreso, Trilanda Renkontiĝo)
Sub aŭspicioj de la Belga Ministerio pri Nederlanda Kulturo kaj de la Ligo de Flandraj Kulturorganizaĵoj

Sekretario: J. Verstraeten, St.-Bernardsesteenweg 1078, B-2710 Hoboken-Belgujo.

Kelkaj kongresaj programeroj:

- Bonvenigo de la kongresanoj fare de la Reĝa Antverpena Esperanto-Grupo "La Verda Stelo", okaze de ĝia 65-jara ekzistado.
- Oficiala malfermo.
- Gazetara konferenco.
- Kunsidoj de landaj kaj fakaj asocioj.
- Kunsido de ILEI.
- Prelegoj fare de Prof. G. Waringhien (Parizo), prez. de la akademio, Drs. E. Frederickx (Antverpeno), Dr. John Wells (Londono), Paul Peeraerts (Antverpeno), Jo Haazen (Antverpeno).
- Publika debato pri:
"Kiamaniere ni esperantistoj povas helpi al sociaj kaj lingvaj malplimultoj?"
- Ekumena diservo.
- Esperanto Programita.
- Akcepto en la urbodomo.
- Artvespero.
- Vizito al la urbo.
- Kongresa Balo.
- Poŝtmarkekspozicio, kongresa poŝtstampo.
- Ampleksa librovendejo.
- Fermo de la kongreso.

Pro tio ke en 1972 ne okazos Universala Kongreso en Eŭropo, ni aranĝas por vi 3-4 tagan bone organizitan kongreson en moderna kaj komforta ejo. Ni prezentas al vi bonajn prelegojn, agrablajn distraĵojn kaj diversajn servojn. Kara kongresan(in)o, estu bonvena en Antverpeno, la urbo de la INTERNACIA ESPERANTO-KONGRESO 1972.

(Aliĝilo almetita)

ĈU VI DEZIRAS GAJNI 10-TAGAN EKSKURSON TRA POLLANDO?

Partoprenu la novan konkurson de la Pola Radio

"FORUMO – EŬROPO – 71"

La respondo al ambaŭ subaj demandoj ebligas lotum-gajni unu el la ĉefaj premioj — 10-tagan senpagan ekskurson tra Pollando:

1. *Kiel vi rilatas al la propono de la socialismaj landoj kunvoki konferencon pri la afero de la eŭropa sekureco kaj kunlaboro, kaj kion vi atendas de tiu ĉi konferenco?*

2. *Kiuj personoj en via lando kaj en kia maniero speciale meritiĝis por la afero de la paco?*

Inter la partoprenantoj de la konkurso, krom la ĉefpremioj, estos lotumitaj multaj objektaj premioj kaj memordonacoj.

La leterojn kun respondoj oni sendu al : **Pola Radio, Esperanto-Redakcio, Varsovio-1, P.O. Box -- 46, Pollando**, en kovertoj signitaj per la devizo: "Forumo" — ĝis la 31-a de decembro 1971 /decidas la dato de la poŝta stampo/.

La rezultoj de la konkurso estos anoncitaj la 31-an de januaro 1972 en la Esperanto-elsendoj de la Pola Radio, je la 6.00 h./ondolongoj — meza: 200 m., mallongaj: 41 m.; 49 m./ kaj je la 16.30 h./ mallongaj ondolongoj: 31 m., 41 m./ laŭ la mezeŭropa tempo.

POLA RADIO

ESPERANTO PROGRAMITA

Paul Peeraerts kun la aŭtoro de Esperanto programita, Hermann Behrmann (dekstre)



Paul Peeraerts, gvidanto de la famkonata kurso — nun en la nederlanda lingvo — sciigis al ni ke 400 kursistoj jam sekvas tiun perkorespondan kurson. Se ni pri-konsideras la relativan mallongan tempon dum kiu ni efektive diskonigis ĝin, ĝi estas la plej granda postmilita sukceso rilate la organizadon de kursoj por Esperantaj.

Pliaj informoj:

Drakenhoflaan 97, 2100- DEURNE

BIBLIOGRAFIO

La libroj estas haveblaj ĉe la librejo "Sonorilo" (s-ro Ise-
rentant R.), Kerklaan 61, BRUGO, Poŝtĉekkonto 152140.



Louis Beaucaire: "Kruko kaj Baniko el Bervalo" — maldecaj anekdotoj. 143 p. + 13 tutpaĝaj desegnaĵoj (ankaŭ maldecaj). Eldonis Torben Kehlet en Kopenhago en la jaro 1970. Prezo: 16 ned. gld.

En tiu-ĉi recenzo mi volas unue turni min al komencantaj verkistoj, ĉu sur tereno de literaturo, ĉu sur tiu de scienco, ĉu sur alia. Versajne en la komenco de via kariero vi sentas timon. Ĉu oni aprezos vian verkon? Ĉu oni opinios ke jes ĝi estas altvalora literaturo aŭ scienco? Nu, ĉu vi scias kion vi devas fari? Vi devas en iu antaŭparolo aŭ averto insulti viajn eventualajn kritikantojn: proksimume laŭ jena maniero: 'Barbaroj, neinstruituloj, primitivuloj porkoj, vi kiuj ne komprenas altan literaturon, formetu tiun ĉi libron; ĝi ne estas verkita por vi! Sed vi, klaraj spiritoj, kiuj scipovas malkovri la nektaron sub la negravaj formoj, ĝuu tiun ĉi trezoron de pura poezio; ankaŭ se ĝi unuavide ne ŝajnas poezia...' ktp.

Tio estas la unua afero kiun mi lernis en la verko de L. Beaucaire. Li faris tion... kaj mi kredas ke ĉiuj komencantoj devas esti dankemaj al li. En tiu-ĉi kazo ni ekscias ke ĉiuj kiuj ne ŝatas la verkon estas jam antaŭe stampitaj kiel pruduloj, hipokrituloj, fari-seoj kaj multaj aliaj belaj epitetoj. Kaj kion diri pri la enhavo? Ni jam ofte spertis ke ŝercoj pri seksaj temoj estas tre malofte vere spritaj. Ankaŭ tie-ĉi. Tamen ni estus maljustaj se ni neus ĉiun spritecon al la verko. La kontraŭo estas vera. Atestas ekzemple pri spriteco ke tre ofte la titolo de iu Esperanto-libro aŭ -verso, aŭ -revuo inspiris la aŭtoron pri iu tia ŝerco. Se doni unu ekzemplon: 'Espero Katolika' sur p. 32. Aliflanke ni devas ankaŭ konfesi ke ofte ni naŭzis! Mi ŝatas bani... en pura akvo, ne en koto. Nu, nestas en tiu libro spiritaj kota-

joj, malpuregajoj. Ĉu rekomendi tian libron? Estas fakto ke la movado demandas tre multe da monaj oferoj al la esperantistoj; ke aperas multaj libroj kaj revuoj kiuj meritas monan subtenon. Ĉu do insisti por ke ili aĉetu ankaŭ tiun-ĉi eldonon? Ne. Ĝi estas... por la amatoroj. Ni volas fine transpreni unu de la vere gajaj, komikaj rakontoj; sur la paĝo 93.:

'La grafino Mambolino organizas kunvenon; al kiu ŝi invitis la tutan mondumanaron de Bervalo. Ĉar la dekoracio estas por ŝi grava afero, ŝi nepre bezonas ruĝan papagon, kies koloro harmoniis kun la salonaĵaj tapetoj kaj ŝia nova robo. La grafino venigas lakeon:

— Burniro, trovu ruĝan papagon por hodiaŭ vespere.

Burniro vane serĉas ruĝan papagon en la magazenoj de la urbo. Fine birdovendisto konsilas al la lakeo:

— En la bordelo de la Haveno-strato, n-ro 7, estas ruĝa papago. Eble vi povus lui ĝin por unu tago.

Efektive Burniro revenas en la domon de la grafino kun bela ruĝa papago. Vespere la luksa birdo tronas en la granda salono. Ekvidante la grafinojn, ĝi grakas: — Ha, jen la nova bordelestrino.

La grafino svenas, kaj la ĉeestantaj sinjorinoj rapidas al ŝi.

La papago laŭte blekas: — tiujn putinojn mi ne konas.

La protesta klukado de la mondumaninoj altiras la sinjorojn el apuda salono. Vidante ilin, la papago ekkrias: — Ha, jen ĉiuj kutimaj gastoj de la bordelo.' Fino.

Ankoraŭ unu rimarko. Ni ne scias ĉu la aŭtoro estis kolektanto... aŭ verkanto. Li nenion diras tiurilate. Sed se li estas la verkinto, tiam ni devus forpreni la ĉapelon por tiom da eltrovkapablo.

BIBLIOGRAFIO

Verkita originale en la Internacia Lingvo de Prof. D-ro Ivo Lapenna. Antaŭparoloj de Reto Rossetti kaj G. Waringhien. 4 500 ekzempleroj de la Unua kaj Dua eldonoj jam delonge forvenditaj. Prezo: 20 gld. aŭ egalvaloro. Tole bindita, 294 p.

Prof. G. Waringhien, Prezidanto de la Akademio de Esperanto, skribas en la antaŭparolo: 'En ne multaj naciaj literaturoj estas trovebla libro tiel science redaktita, tiel oportune utiligebla, tiel pense riĉiga, kiel ĉi tiu verko.'

En la Rimarko pri la Tria Eldono la aŭtoro skribas: 'Kiel aŭtoro mi havas la kompreneblan esperon, ke Retoriko estos same bone akceptita de la novaj legantoj, kiel ĝi estis de la antaŭaj; kiel multjara laboranto de la Internacia Lingvo mia sola deziro estas, ke ĝia enhavo inspiru kaj stimulu al pli konvinka kaj sindona agado por Esperanto.'

Bertram Potts: "Nokto da Timo". Tri noveloj, 80 paĝoj. Eldonis: Dansk Esperanto-Forlag sub direkto de s-ano Friis en Aabyhøj, Danlando. Prezo: 10 dan. kronoj.

Ni jam sciis ke s-ano B. Potts povas bone paroladi; ni nun scias ke li ankaŭ kapablas bone skribi. La lasta rakonto temas pri Marjorie Boulton kaj estas lerte verkita. Sajne ŝi mem tre ŝatas la rakonton. La du aliaj streĉas la atenton; kaj je la fino, estas io tute ne atendita kio renversas la situacion... do ĝuste tio kion bona rakonto bezonas. La lingvaĵo estas modela kaj ne malfacila. Do alia kvalito: bona legaĵo por ankoraŭ nespertaj esperantistoj. Ni tre rekomendas la libron. Neniu aĉetonto bedaŭros la aĉeton.

Profesorino Clelio Conterno Guglielminetti: "Eta Vivo" Poemaro eldonita de "Stafeto" sub direkto de Prof. Juan Regulo Perez en La Laguna sur la Kanariaj Insuloj. 143 p. Prezo: 2 Us. dol.

En simpatia antaŭparolo Prof. Waringhien parolas pri libro de neordinara kvalito. Efektive tiu poemaro havas nombron da belaj poemoj. La enkonduka 'Kajero Nigra' ekzemple estas originala kaj bela. 'Voĉeto' estas tre poezia. 'Reveno Postmilita' bone esprimas la impresojn kiam la aŭtorino revenis en domo longtempe forlasita. Ankaŭ 'Grizaj Haroj' estas tre bela poemo. En 'Universitata Biblioteko' kaj 'Lernantinoj' estas frappe reliefigita la opono inter atmosfero seke kaj peze studa kaj la ekstere jubilanta sezono. Ne malofitas la religia inspirado. Ekzemple la komparo inter la filo de Maria kaj de iu ajn patrino (p. 47) estas peco de pura poezio.

Tamen ni devas ankaŭ montri kelkajn malkulojn kiuj — laŭ nia strikte persona opinio — kelkloke difektas la poeziecon. C.C.G. iom ofte uzas la elkrion 'ho'... kio havas la kontraŭan efikon. En nia nacia lingvo oni lokigas tiun vorton en la kategorio de la tiel nomataj 'ŝtopvortoj' (kiam oni ankoraŭ bezonas unusilaban vorton por kompletigi la verson!). Foje oni havas la impreson ke la aŭtorino ne sukcesis adekvate esprimi kion ŝi sentis ('Espero' sur p. 86). Ni scias ke la vort-ordo en Esperanto estas libera; tamen frazo kiel '... kaj vi benata mia frukto estas' (por ke ĝi rimu kun 'nestas' sur p. 102) estas kondamninda laŭ poezia vidpunkto. Cetere ankaŭ sur p. 44 C.C.G. ofertas tro de la poezieco al la rimo, kiu tiamaniere sonas tro artefarita, nenatura. Estas bedaŭrinda ke la aŭtorino ne reverkis tiujn poemojn. Tiam ni havus en mano poemaron poezie perfektan (?).

Konkludo: nova, aŭskultinda voĉo. Aĉetu tiun beletran kajeron, vi poeziamentoj.
Drs. F. Roose

TEKSTOJN por la numero 'januaro-februaro', tuj ensendu, ni petas! (plejlaste la 10.1.72)



57-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO Portland (Oregon), 29.7. - 5.8.1972

Alta protektanto:
Governor Tom McCall, Estro de la ŝtato Oregon

Konstanta Adreso:
Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam 3002, Nederlando

OFICIALA KOMUNIKO

Portland Hilton = komforto kaj lukso

Malofte oni povas labori kaj loĝi dum la Universala Kongreso en unu sama konstruaĵo. La 57a proponas ĝuste ĉi tiun avantaĝon! Hotelo Hilton en Portland kun siaj 500 diverskategoriaj loĝocambroj (ekipitaj per radio, TV, telefono, aŭtomata klimatizo k.a.), multenombraj kunvenejoj kaj salonoj, varmakva banbaseno, saŭno, garaĝo kaj pluraj aliaj modernaj instalaĵoj atendas esperantistajn gastojn, al kiuj ĝi donos apartajn favorojn, i.a. senpagan kongresejon.

Usona vizo

Kun la escepto de civitanoj de Kanado, ĉiuj aliaj ŝtatanoj bezonas enirvizon por viziti Usonon. Necasaj dokumentoj: plenigita formularo, valida pasporto, fotografiaĵo kaj la "atesto pri intenco forlasi Usonon post kelktempa vizito". La vizo-petojn pritraktas ĉiuj vizo-fakoj de usonaj ambasadoj kaj konsulejoj. Vakinigo kontraŭ variolo ĝenerale ne plu estas postulata.

Survoje al Portland

Kanadaj esperantistoj invitas al partopreno en la 14-a Kanada Kongreso de Esperanto en Victoria, B.C., la 24an, 25an kaj 26an de julio 1972. La 27-an okazos komuna veturo al Portland. Informas: K.K. de Esperanto, 1712 Haultain St., Victoria, B.C., Kanado.

100 al San Francisco

Nur al 100 personoj oni garantias favorajn prezojn de la ĉambroj en la Oficiala Postkongreso en San Francisco. La organizantoj ceteres promesas elstare interesan programon kaj konsilas tuje aliĝi.

Minimumigu la vojaĝkostojn

Lastatempa anonco pri malaltigo de transatlantikaj tarifoj de flugkompanioj, diversaj rabatoj kaj karavanaj vojaĝoj prezentas vastajn eblecojn por efektiviĝo de la kongresvizio je optimumaj prezoj. Volonte informas ĉiu komerca agenteo de flugkompanio. Pri la karavano de UEA oni kontaktu kun f-ino Vermaas M. H., komisiito por specialaj taskoj de UEA, Nieuwe Binnenweg 70 II R, Rotterdam-3002, Nederlando.

Junulara Konferenco en Portland

Por la IJK de TEJO 1972 akceptiĝis la invito de Pollando. Dum la UK en Portland okazos tritaga konferenco de TEJO, kaj oni diskutos ĝenerale pri la samaj temoj kiel en la IJK. Antaŭvidita estas komuna loĝado en la Universitato. Kiu deziras helpi aŭ informi, turnu sin al Guy Matte, 214 Gloucester, app. 7, Ottawa, Kanado.

Unuaj simbolaj aliĝoj

Kvar britoj, unu nederlandano kaj unu japano sendis sian kontribuon por simbola aliĝo kaj tiel manifestis moralan kaj financon subtenon al la 57-a UK en Portland, Oregon. La nomoj de ĉiuj simbolaj aliĝintoj estos enskribitaj en la Kongresa Libro 1972 kaj ili ricevos ĉiujn presajojn de la Kongreso. Minimuma kontribuo por simbola aliĝo estas 30,— gld aŭ ekvivalento.

Reklami kostas monon, ne reklami kostas pli...

Favoran reklamtarifon (50%-rabato por Eldonejoj ktp) proponas la Loka Kongresa Komitato al ĉiuj, kiuj deziras profiti la okazon por meti anoncojn kaj reklamojn en la Kongreslibron 1972. Detale informas la konstanta adreso de la kongreso.

Por ĉiuj viaj asekuroj - reasekuroj

unu adreso :

J. VERDYCK & Co Pvba.

ANTWERPEN, Lange Nieuwstr. 30

Telef. 03/320902 - Telekso 32283 - Telegr. "Dyckassur"

Oficejoj en London - Rotterdam - Lieĝo.

Reprezentanto ĉe "Lloyd's - London"

Unuaklasa Servo

Faklerta laboro.

Korespondas en Esperanto.

FIRMA VAN ISEGHEM & VERSTRAETEN

P. V. B. A.

St.-Bernardse steenweg 631
Hoboken

Vitraloj - Speguloj -
„securit” vitro
kolorigitaj vitroj
aluminiaj senmastikaj
stangoj por kupoloj

Vitro-cementoj por
tutvitra-konstruaĵoj
mastiko

Telefono 272875